Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto, n-ro 1
januaro 1986

ATEN TINDAĴOJ

- 14 02 1987 : estrarkunsido
- 21 02 1987 : Semajno de Internacia Amikeco en Leuven.
- 14 03 1987 : ekde 10.00 h. estrarkunsido
  ekde 13.30 h. ĝenerala jarkunsido

laŭ tiu ĉi vojo, ĉiuj membroj de FEL estas invitataj al la ĝenerala jarkunsido. La grupestroj bonvolu averti siajn klubajn gemembrojn kaj inviti ilin.

La grupestroj krome estas petataj sciigi al la sekretario antaŭ la fino de februaro la nomon, adreson kaj telefonnumeron de la prezidanto, sekretario, kasisto kaj administranto(j) / reprezentanto(j) ( 1 por ĉiu komneciĝinta kvindeko da membroj je 31 12 1986.)

URĜA ALVOKO.

FEL serĉas personojn kiuj pretas helpi en la akceptado de telefonalvokoj sekve de radio- aŭ TV-elsendoj kaj/aŭ por fari administrajn laborojn en tiu rilato.

Pretuloj bonvolu tuj-tuj-tuj sin anonci al P. Peeraerts.

Anticipan dankon.

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Meidoorn 42, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 1[illegible]
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de 10 01 1987 en Antverpeno.

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR); Kiki Tytgat (KT), Hilde Vaningelgem (HV) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Edward Symoens (eksterlande).

Prezidas / ID

Protokolas : JB

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 13 12 1986 estas aprobita.

2. FINANCOJ

2.1. La ĝenerala financa situacio estas normala.

2.2. Eldonoj (Stafeto) :
Antaŭ la UK aperos 2 verkoj. Unu de Deck Dorval kaj dua de Waringhien

2.3. Ekspozicioj : Alex Humet kaj Dirk Deweerdt okupiĝos pri modern-aspekta ekspozicimaterialo.

2.4. LVS-Informfondaĵo.
Intertempe La Verda Stelo ĝiris la sumon de sia fondaĵo pri Informado. Temas pri sumo de BF 142.000,-
Dankon al La Verda Stelo.

2.5. Maklerajo por reklamanoncoj.
Rilate al komercaj reklamanoncoj por ESPERANTO PANORAMA decidiĝas fiksi la maklerajon je 10 % de la kostoprezo.

2.6. Buĝeto por la ministeria subvencidosiero.
Nia buĝeto por 1987 devas esti ensendita antaŭ 15 01 1987.
ER kaj PP okupiĝos pri tio kaj, se necese, petos telefone plilongigon de la ensendperiodo al la ministeriaj servoj.

3. KUNORDIGADO

3.1. Je peto de Marc Vanden Bempt ni sendos ankaŭ al S-ro Van Sina, urbestro de Leuven, petleteron por partopreno en la Jubilea Patrona Komitato.

3.2. Perado de revuoj.
La Esperantocentro pluokupiĝos pri la perado de revuoj, sed okaze de malfacilaĵoj - ĉefe translimaj - RR transprenos la taskon.

3.3. Premio por plej forta membrokresko.

La premion gajnis la Genta LA PROGRESO. Ĝi estos solene aljuĝita okaze de la ĝenerala jarkunsido en marto.

3.4. Konkurso pri slogano.
La konkurso pri nederlandlingva slogano pri kiu temas en la protokolo pri la antaŭa estrarkunsido (kaj en aparta artikolo en ĉi bulteno - vidu aliloke - kaj en ESPERANTO PANORAMA) estos premiita per dek eldonoj de Stafeto.
La findato de ensendoj estas 27 03 1987
La prijuĝado okazos en du fazoj :
1-e : la ensendaĵoj estos antaŭmetataj al ekstermovada profesia-pri-reklamo-persono
2-e : pere de kvinpersona juĝokomisiono en la kongreso en Amersfoort ( 03-04-05 / 04 / 1987 ). Ni proponos la 4-an de aprilo.
La aljuĝo de la premio okazos je tiu sama tago.

3.5. Ĝenerala jarkunsido de FEL : 14 03 1987
Je 14 03 1987 ekde 13.30 h. okazos la ĉi jara ĝenerala jarkunsido.
La grupestroj jam nun estas petataj ĝustatempe ensendi la kutimajn informojn pri la kunmeto de sia estraro kaj de la administrantoj en FEL.

Ili ankaŭ bonvolu konatiĝi la nomon, adreson kaj telefonnumeron de eventualaj kandidatoj por la estraro.

3.6. Ĉefdelegito de UEA en Belgio.
ID sendis leteron al Marc Demonty kaj F-ino Dreze kun detala priskribo de niaj argumentoj (vidu INFORMILO-n de decembro 1986 - protokolon punkto 3 )
Ĝis nun ne envenis kia ajn reago.

3.7. Seminario por instruantoj.
ID intencas organizi seminarion por instruantoj kunlabore kun S-ino Audry Mee. Ĝi daŭros plurajn tagojn.
Interesitoj informiĝu ĉe Ivo.

3.8. Kadrokursoj.
3.8.1. : ESPERANTO 2000 proponas okazigi la prokrastitan kadrokurson por kasistoj/sekretarioj je 21 02 1987 en Leuven.
Aprobite.
3.8.2. : Ni proponos kroman parton, nome kunsideton por kursgvidantoj cele al alveno al komuna starpunkto por konservi la lernantojn en la kursoj.

3.9. "Vlaanderen leeft" - kampanjo de Ministro DEWAEL.

Flandra Esperanto-Ligo
vlaamse esperantobond v.z.w.
esperanto
internationale taal

*Hoera! De nieuwe Esperanto-leerlingen.*

*U voelt het waarschijnlijk, u ziet het, u ruikt het: in dit Jubeljaar is een grote toestroom van leerlingen te verwachten. Maar het probleem van de Esperanto-kursisten manifesteert zich na de beëindiging van de lessen, nl. dat ± 90 % van de kursisten nooit Esperantist wordt.*

*Hoe zouden we de nieuwelingen kunnen bewegen om hun opgedane kennis om te vormen tot een beleven van Esperanto? Wat zouden we nu kunnen doen om straks het aantal afvallers te kunnen verminderen?*

*De volgende punten als voorstel ter diskussie. Hierbij is de centrale (kern)gedachte dat de intermenselijke kontakten en het kontakt met de beweging vanaf het begin van de kursus gestimuleerd worden. Tijdens de Dag van de Vriendschap te Leuven wordt dit dan besproken met alle geïnteresseerde kursusleiders van 11.00 tot 12.30 u. Het is de bedoeling om diezelfde dag nog te komen tot konkrete afspraken om dit plan (of een deel) te realiseren.*

*I. Over kursussen*

*1.1 Kursussen in Vlaanderen op elkaar af stemmen of gelijk stellen.*
*1.1.1 Eens in de zoveel tijd een gezamelijke les/bijeenkomst.*
*1.1.2 Begeleiding van kleine groepjes (naast de onderwijskracht) door de niet betalende studenten en andere vrijwilligers.*
*1.1.3 De taak van de vrijwilligers bestaat er in kontakt te nemen met een klein groepje nieuwe studenten uit zijn onmiddellijke omgeving en ze te begeleiden, stimuleren. Hierbij denken we vooral aan een kursus zelfstudie.*

*1.2 Over de prijs van kursussen*
*1.2.1 Gratis voor hen die zich bereid stellen (zonder verregaande kontrole op de uitvoering daarvan) binnen één, twee of drie jaar, een x-tijd een groepje leerlingen op de een of andere manier te begeleiden.*
*1.2.2 Beter lijkt mij aan de kursus één of meerdere evenementen te verbinden, waarvoor dan in feite betaald wordt, zodat indien gewenst de kursus zelf gratis is. Een evenement zou een bustocht naar een ander dan Nederlands taalgebied voor een ontmoeting met Esperantisten aldaar kunnen zijn.*

*Ondo da BRT-elsendoj*

*Sabaton, la 24an multaj Esperantistoj streĉe rigardis la televid-elsendon Terloops pri Esperanto. Membroj kaj ne-membroj kiujn mi renkontis tre favore reagis pri ĝi. Intertempe ankaŭ jam pasis 5 radioelsendoj. Laŭ la promesoj sekvos ankoraŭ 16 radio- kaj 1 televidelsendo.*
*Mi volas dankegi ĉiujn, kiuj kunlaboris kaj kunlaboros por realigi tiun brilan informlaboron.*

*Via,*
*Ivo Durwael*
*Prezidanto*



Ministro Dewael dissendis cirkuleron pri tri-jara kultura kampanjo en Flandrio.
Unu el la tri partoj koncernas 'krean arton" kontenantan i.a. literaturon.
Post ekzameno kaj prikonsidero de eventuala tradukado de flandraj verkoj, ni venas al la konkludo, ke fakte la kampanjo ne entenas ion interesan por ni.

4. INFORMADO

4.1. Radio - TV

Okazos entute 15 elsendoj en la radio, dank al la bonega agado de Louis Janssens ĉe BRT.
Ĝis nun jam okazis :
- je 08 01 1987, 90-minuta radio-programo "Het Vermoeden" kunlabore kun Marc Vanden Bempt kaj Hilde Vaningelgem.
- je 09 01 1987, 20-minuta radioprogramo kadre de "~~De~~ Klapstoel" en kiu ĉefrolis Petro De Smedt.
- je 13 01 1987 okazos radioprogramo "Broccoli" pri Esperanto.

TV-programkompilanto Bob Van Bael intencas filmi programon por "Terloops" je 24 01 1987. Kiam li telefonos por interkonsenti, al li estos proponata prokrasti tion ĝis 21 02 1987, okaze de la Semajno de Internacia Amikeco en Leuven, ĉar tie ja estos ne nur pli da homoj, sed certe ankaŭ pli da junuloj.

4.2. Informdado - ĝenerala alvoko.

PP atentigas pri la grandega kromlaboro en la Centro post publika manifestacio pri Esperanto. La telefono normale ne haltas kaj dissendado de informmaterialo abundas. Tio estas iom tro por la homoj laborantaj en la Centro.
Tial li alvokas al <u>u r ĝ a</u> kunlaboro kaj, do, serĉas pretulojn por akcepti telefonalvokojn kaj/aŭ dissendi informmaterialon.
Interesitoj urĝe sin anoncu al PP.

5. UK en Varsovio - busvojaĝo.

KT kunigis kiom eble plej multe da donitaĵoj akiritaj ĉe du bus-entreprenoj : VTB/VAB kaj Huybrechts.
Post priekzameno de ĉiuj elementoj elmontriĝas ke la pli interesa estas Huybrechts.
Ŝi do daŭrigos kun ĉi lasta.
Dua informilo kaj aliĝilo aperos baldaŭ.

6. DIVERSAĴOJ

6.1. Klubo 100

PP anoncas, ke la mono ĝirita al FEL por Klubo 100 troviĝas ankoraŭ en nia konto.
Kion fari per tio ?

Kiel jam decidite en la ĝenerala jarkunsido de BEF, la mono ankoraŭ disponebla servos por financi la jarfinan festotagon, alivorte la Esperanto-tagon planitan en decembro en Bruselo.

6.2. "De Polyglot van Vlaanderen"

KT enskribiĝis por la ekzameno kaj proponis ankaŭ ekzameniĝi en Esperanto.
Tio tamen estis rifuzita.
Ŝi - same kiel ni ĉiuj cetere - trovas tion ne tre serioze. Tamen, por ne malbone influi la ekzamen-jurion, ŝi atendos ĝis post la ekzameno por reagi.

Fino de la kunsido : 12.30 h

JB

---

## PRI LA KONKURSO PRI SLOGANOJ

Antaŭ ne longe mi vidis tre atentokaptan kaj - laŭ mi - multsignifan reklamafiŝon de PHILIPS. Ĝi tekstis :

PHILIPS LICHTJAREN VOOR.

Legante ĝin laŭtvoĉe, oni aŭdas : "Philips ligt jaren voor".
Dusenca, do, kaj ambaŭ celtrafaj.

Alia afiŝo altiris mian atenton; afiŝon pri vestaĵoj.

HEY IS VOOR RUIT

Laŭte ĝi sonas : " Hey is vooruit"
Sama efekto.

Kaj jen reaktualiĝis en mia menso la ideo lanĉita antaŭ kelka tempo organizi konkurson pri reklam-sloganoj nacilingvaj.

FEL-estraro nun konvikiĝis pri ĝia neceso kaj do malfermas konkurson por la plej taŭga nederlandlingva slogano.



La plej bona estos premiita kaj uzota por nia nova reklamafiŝo.

Memkompreneble, sloganoj kun duobla senco, kiel ekz. la du suprenomitaj, ĝuos preferon.

Tial ni volus alvoki niajn gruprespondeculojn lanĉi la ideon inter siaj gemembroj.
La partoprenontoj povas sendi sia(j)n propono(j)n al la Esperanto-Centro je la atento de la prezidanto.

La premio konsistos el dek eldonoj de Stafeto (kadre de la librorondo) kaj estos aljuĝita okaze de la venonta nederlanda Esperantokongreso en Amersfoort okazonta je 3-4-kaj 5-aj de aprilo 1987.

Por pliaj informoj, kontaktu Ivo aŭ Jan.

JB

---

## LA INTERHOMAJ RILATOJ EN FEL - X

### G V I D A N T O J

Mi estas lernanto de Esperantokurso. Mi opinias ke la grupo konsistas el interesaj homoj. Kreiĝas amikeco. Mi konatiĝas kun Esperanto-klubo, ĉeestas kongresojn. Iom kritikeme mi priparolas miajn spertojn. Tamen, ĝenerale mia entuziasmo kreskas, mi trovas pli kaj pli da amikoj. Kaj tiam iu proponas al mi gvidan rolon en la movado. Mi akceptas.

Subite mi ŝanĝiĝas : mi ne plu estas la sama persono. Mi ankoraŭ estas iom kritikema, sed nun ne plu por la organizantoj, sed por la ordinaraj membroj, ĉeestantoj. Mi malpli multe babilas pri miaj personaj opinioj, sed pri movadaj problemoj kaj nur kun difinitaj personoj. Mi iomete enŝlosas min kun aliaj gvidantoj, ĉar ni sentas la pezon de nia respondeco.

Ĉu eblas analizi tiun ŝanĝiĝon en TA-skemo ?

Mi supozas, ke ĉe konatiĝo kun la Esperantomovado la Matura Infano ludas gravan rolon : nia scivolemo, malfermiteco por novaj spertoj, ĝuo pro nova malkovro. En la rolo de gvidanto, ni tuj lasas la gvidan rolon al la Kritikema Gepatro. Kritikema Gepatro postulas Adaptitan Infanon. Tie povus esti la bazo de konfliktoj. Kiel solvi tiun ĉi konflikton ? Mi vere dubas ĉu kunlaboro surbaze de kompleta egaleco povus funkcii. Mi ne diras, ke ĝi ne eblas, sed la amaso da malsukcesoj en komunumo de nur kelkaj personoj pravigas mian dubon.

Ŝajnas do neeviteble, ke gvidanto devas funkciigi sian Gepatron. Sed anstataŭ nian Kritikeman Gepatron, ni provu aktivigi nian Zorgeman Gepatron. La diferenco estas, ke en la unua situacio, ni postulas obeemon, ni estas pelataj per ideo por atingi mezureblajn rezultojn.

En la dua sinteno, nia gvidlinio estas la zorgoj pri la farto de niaj kursanoj, klubanoj, kongresanoj, legantoj ktp.

Aŭ pli klare dirite : la diferenco troviĝas en la emfazo de materiaj rezultoj aŭ plenumo de homaj bezonoj.

Kaj la dua metodo devus laŭ mi pli efike konduki al materiaj rezultoj.

Ivo Durwael

---